SCIENCA REVUO de Internacia Scienca Asocio Esperantista (BEOGRAD, Jugoslavio)	El Vol. 22 n-ro 4 (90) 15. 9. 1971.

EKSTERTERAJ CIVILIZOJ SUR LA TERO

(J. Chvosta, Podebradý, Ĉeĥoslovakio)

Preskaŭ jam dum dudek jaroj la homo penetras en la kosmon liberiginte sin de la tera gravito. Eĉ se la ĝisnunaj flugoj en la kosmo estas malgrandaj paŝetoj kompare al la grandeco de la kosmo konata al la homaro per tele- kaj spektroskopoj, ili tamen tre ekinteresis la homaron kaj stimulis entuziasmon pri kapabloj kaj povoj de homoj. La homaro konvinkiĝis, ke estas eble forlasi la naskan teron kaj vagi tra la kosmo, eĉ se ĝis nun oni nur kuraĝigas tuŝapude ĉe bordo de la kosmo, same kiel malgranda infano, kiu ne scias naĝi. Longaj flugoj de kosmaj ŝipoj kun homa anaro estas ĝis nun nur utopio. Ĝis nun homo ekstaris nur sur la surfacon de luno kaj penso pri okupado de aliaj planedoj estas ĝis nun nur revo. Sed intereso de la homaro ekzistas kaj ĝin ne povas malgrandigi eĉ voĉoj de skeptikuloj, kiuj plendas pro malnecesaj elspezoj, ĉar oni ja povus la monon dediĉi al malsataj homoj. Tio ja estas vero, sed ŝajnas ke tie estas maljuste atakata sfero tute alia ol tiu kiu meritas tiun atakon. Certe la sumoj dediĉitaj al kosmaj esploradoj iomete malpligrandigus la malsaton sur la tero. Sed nepre ne tiom, kiom alportus forigo de armeoj, militistoj kaj armiloj. Nepre estus bone ke tiuj skeptikuloj turnu la atenton unue al forigo de tiuj ĉi malnecesoj.

La astronomoj jam ekkonis ke nia suno estas normala astro, da kiuj oni vidas sur la firmamento multon. Ĉiuj videblaj steloj estas tiaj sunoj, pli malpli grandaj, la suno estas inter ili nenia escepto, oni ja povas diri ke ĝi estas mezgranda tipo. El tio do sekvas, ke ekzistas ankaŭ sistemoj de planedoj ĉirkaŭ tiuj steloj. La ĝisnunaj teleskopoj estas tre malfortaj por malkovri planedojn eĉ ĉe la plej proksimaj steloj, sed el aliaj observadoj oni povas konkludi ke ankaŭ aliaj steloj havas siajn planedojn. El tio plue sekvas, ke tie

povas ekzisti ankaŭ planedoj kie estas ebla vivo kaj kie ekzistas raciaj estaĵoj. Nepre ekzistas en la kosmo planedoj kie ekzistas civilizo (oni ne povas diri la homara civilizo, sed aliaj rezonoj montras ke la pensanta estaĵo ne povas tro diferenciĝi de homoj), kiu ja povas esti eĉ pli altgrada ol la surtera civilizo. Kaj se la surtera civilizo jam sukcesis fari unuajn paŝojn en la kosmon, nepre pli perfektaj civilizoj jam regule vojaĝas tra la kosma spaco kaj vizitis certe ankaŭ nian teron. Eĉ se oni rifuzas tion argumentante ke la kosmaj distancoj estas grandegaj kaj la probableco de vizito ĝuste de nia tero estas minimuma, oni tamen atentis kelkajn neklaraĵojn el la historio, kiujn oni ĝis nun klarigis nesufiĉe. La klarigo pri ekstertera civilizo, kies postsigno estas certa neklaraĵo, aspektas tute logika kaj natura. Aperis du libroj pri tiuj ĉi aperaĵoj ("Rememoroj pri estonteco" de Däniken,"Mateno de sorĉistoj" de Bergier-Pawels, - almenaŭ ili iĝis tre serĉataj. Tiuj libroj kaj multaj aliaj artikoloj alportas materialojn, el kiuj oni povas konkludi ke nian teron iam vizitis anoj de eksterlanda civilizo kaj ili lasis tie siajn postsignojn. Oni povas eĉ pensi pri tio ke certa kolonio de eksterteraj civilizitaj "homoj" restis sur la tero, ne povante per siaj rimedoj ripari la difekton de sia kosma ŝipo. Nome, kelkaj antikvaj civilizoj, sumira, egipta, ĉina kaj aliaj, aperas tuj kvazaŭ jam pretaj, kvazaŭ inter ili kaj la antaŭuloj estus neklarigebla kvalita salto. Tiuj civilizoj aperas subite, sen antaŭa longdaŭra evoluo. Oni ja ne povas tion pruvi, oni ne havas tiom da materialo, sed la ĝis nun kolektita materialo montras tian neklarigeblan salton. Kompreneble tia kolonio de eksterlandaj kreitoj, kiuj pro neforigebla difekto de sia kosma ŝipo ne povas forflugi, nepre strebus eduki kaj civilizi siajn novajn konatulojn laŭ siaj konoj el sia hejmo kaj laŭ la ebloj de nova ĉirkaŭaĵo . La ĉirkaŭaj "sovaĝuloj" kompreneble ne estus kapablaj atingi mense siajn novajn najbarojn, kiuj por ili estus "dioj" aŭ aliaj supernaturaj estaĵoj, sed ili nepre estus plialtigitaj en sia grado de civilizo. Kaj se oni legas en la biblio, ke "Filoj de dio estis sur la tero kaj venis al homaj filinoj, kiuj naskis idojn al ili", se la mitoj rakontas pri blankaj viroj, kiuj iam venis al ili kaj perfektigis ilin, oni povas facile konkludi ke tiuj ĉi "dioj" aŭ "de malproksime venantaj homoj" estis anoj de ekstertera civilizo. La simileco de atomaj eksplodoj kaj la priskribo de detruo de bibliaj urboj Sodoma kaj Gomorrha refoje vekis ideon ke tio, kio tiam okazis, estis forflugo de grandega kosma ŝipo. La loĝantoj de tiuj urboj nepre estis avertitaj, sed la plimulto ne obeis, ĉar ili ne komprenis. Kaj tial la detruo de urboj iĝis tia. Ankaŭ la "sala ko-

lono" de Lot-edzino estas facile klarigata, se oni pripensas ke la brilo de atomeksplodo blindigis tiun, kiu senprudente enrigardis ĝin. Kompreneble la postaj mitoj kunigis la tutan okazaĵon kun justeco kaj maljusteco de logantoj, sed verŝajne la plimulto de primitivuloj ne komprenis la danĝeron, ne kredis ĝin kaj restis en la detruitaj urboj. Sed en la biblio estas pluraj priskriboj, kiam teranoj estis prenitaj "sur la ĉielon". En kazo de kosmaj ŝipoj aŭ aliaj flugmaŝinoj de eksterteraj civilizoj, tia "ĉielpreno" estas fakto priskribita nur per racio de tiama homo. Nepre ĉiu alterigo de flugmaŝino estis miraklo por tiamaj homoj, ili "sentis ke la tero tremas", ili vidis "nubojn kiuj ĉirkaŭis la ĉielanon" kaj ili eĉ mortis, se "ili nur tuŝis la aperaĵon".

Sur kelkaj bildoj kaj pentraĵoj aperas figuroj, en kiuj nur nun oni ekkonas homojn en skafandroj aŭ en kosmaj ŝipoj. Tia bildo ekzistas en Jabbaren-groto en Saharo, kie la figuro havas kapon kun struta ovo, sed same oni povas vidi kapon de skafandro. En monaĥeja preĝejo Visoki Dečani estas bildo, kie en nuboj estas pentritaj homaj figuroj . Kaj tiuj ĉi nuboj similas al kosmaj ŝipoj, kiujn infano pentrus. Sur multaj antikvaj konstruaĵoj estas ornamaĵoj, kiuj aspektas kiel nun konataj diversaj kosmaj korpoj, flugantaj teleroj kaj aliaj.

Estas ankoraŭ aliaj problemoj. En Baalbek en Libano ekzistas granda platao, kiu konsistas el ŝtonaj blokoj dudek metrojn longaj. Eĉ nun la lokigo de tiuj blokoj estus granda teknika problemo. La meteoro kiu falis en la jaro 1908. en Siberion, ĝis nun ne estis trovita, kaj la postsignoj ne aspektas kiel tiuj post falo de meteoro. La "nigra pagodo en Hindujo" havas supre kupolon kiu pezas du mil tonojn. Sur multaj lokoj troviĝas mineraloj, tektitoj, kiuj povis ekesti nur kiel sekvo de atoma eksplodo. Kaj la malgrandaj satelitoj de Marso montras multajn neregulecojn, kiujn oni facile forigas se ili estas kavaj. Sed en tiu kazo ili ja nepre estas artefaritaj.

Fine en la jaro 1917. okazis en la portugala urbo Fatima granda miraklo, aperaĵo kiun vidis centoj da homoj. La nuntempa epoko ne kredas plu pri mirakloj, do oni klarigis tion per "amasa histerio". Sed ĉu tie ĉi ne povis temi pri renkonto kun kosma ŝipo kaj kun ekstertera estaĵo?

La ambaŭ libroj do kolektas ĉiujn ĉi neklarigeblajn aŭ nesufiĉe klarigitajn fenomenojn kaj lasas la meditadon, ĉu ili ne estas postsignoj de efikado de eksterteraj civilizitoj, kiuj iam vizitis nian teron. Kompreneble oni povas klarigi ilin ankaŭ alimaniere. Oni avertas: kiam en la pasinta jarcento vivis la homaro sub impreso de konstruado de grandaj kanaloj (Panama, Suez), la

astronomo Schiapparelli malkovris la kanalojn ankaŭ sur Marso. Post li multaj vidis kanalojn, aliaj priskribis eĉ iliajn ŝanĝojn, sed ankaŭ multaj konfesis ke ili vidis eĉ ne unu kanalon, ke ili eble estis nur "optika iluzio". Nuntempe oni jam povas aserti ke sur Marso estas nek pli supera civilizo nek kanaloj pretigitaj de ili. Tiam la sukceso de homaro post la granda konstruadovekis iluzion de similaj konstruaĵoj ankaŭ sur aliaj planedoj, komprenebleilin 'konstruis" pli supera civilizo. Sed tiuj Marsanoj nepre ne ekzistas, nek ekzistis, alie ili transloĝiĝis sur la Teron, ĉar la alte evoluinta civilizo nepre ne allasus dezertigon de sia planedo, aŭ se tiu dezertigo estas neevitebla, kapablus transloĝiĝi.

Nun la historio ripetiĝas. Sub la impreso de sukcesoj en la kosmo oni pli precize atentas la fenomenojn sur la tero kaj vidas, aŭ kredas vidi, en ili postsignojn de aliaj civilizoj, kompreneble pli perfektaj ol nia civilizo. En kazo de la satelitoj de Marso la historio ripetiĝas eĉ ĉe la sama planedo. Ĉu do Marsanoj ne postlasis kanalojn, sed artajn satelitojn, kiuj ĝis nun (kiam la civilizo de Marso ne plu ekzistas aŭ ĝi estas sur la tero) cirkulas ĉirkaŭ la planedo, kiu iĝis neloĝigebla? Ĝis nun ne estas sufiĉe da pruvoj por konkludi faktojn. Eble oni bezonos novajn metodojn por esplori tion. Eĉ se estas multo da faktoj, oni nur malfacile povas rekonstrui la eksan realecon. Certe multon povos alporti ĝuste esploroj sur aliaj astroj. Jam nun, el la alportitaj ŝtonaĵoj desur la luno, aperis interesa hipotezo: kelkaj ŝtonaĵoj de la luno mcntras kvazaŭ la suno, por eta momento, ekzemple unu minuto, multoble pligrandigis sian briladon. Kaj tio ja okazis jam dum la etapo dum kiu oni kalkulas la homaran civilizon. Do povas esti ke dum unu minuto la tero estis cent- aŭ miloble briligita de la suno. Kompreneble tiu pligrandigo trafis nur malgrandan parton de la tero. Ĉu ne devenas de tio la nigra raso aŭ la diigo de suno en la amerika civilizo? Ĉiu civilizo ja adoras la sunon, sed ĝi estas adorata plej multe en la amerika civilizo. Ĉu tio ne ekestis pro tiu unu minuto? Kompreneble tio estas nur hipotezo. Por pruvo mankas ankoraŭ multaj aliaj sendependaj esploroj. Kaj ĝuste la esploroj sur la luno kaj sur aliaj planedoj de nia sunsistemo povas pliklarigi ankaŭ la estintecon de la terglobo. Multaj el la problemoj, kiuj estas priskribitaj en tiu ĉi artikolo, povos esti klarigitaj, kiam oni detale esploros eble la surfacon de la luno, de Venuso aŭ de Marso. Kaj tiel la kosma esploro povas eĉ kontribui al la klarigo de tiuj ĉi ĝis nun neklarigeblaj aŭ nesufiĉe klarigitaj fenomenoj.